


**Kolorigula
familion**

**E
juna
amiko**

**INTERNACIA
LERNEJANA
ESPERANTO-REVUO**

Aprilo, n-ro 90/2 (53), 17a jaro



Juna amiko, revuo por lernejoj kaj komencantoj. Eldonata de la Hungara Esperanto - Asocio kaj aŭspiciata de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI)

Aperas kvarfoje jare: februare, aprile, septembro kaj novembro.

Redaktoro kaj grafikoj: Stefan MacGill.

Adreso de la redakcio: pf. 193, H-1368 Budapest, Hungario.

Abonprezo en Hungario ĉe HELIR: 40 ft. (por eksterlandano 48 ft.) Internacie ĉe UEA: 8,40 gld.

Anoncoj:

Kvaronpaĝo: 250ft soclande aŭ 25gld aŭ 3 jarabonoj en aliaj okcidentaj valutoj.

Duonpaĝo: 420ft aŭ 42gld. aŭ 5 jarabonoj.

Tuta paĝo: 600ft. aŭ 60 gld. aŭ 7 jarabonoj.

Koloroj abundas ĉi-foje. Ni prezentas la unuan plenkoloran kovrilon de nia revuo! Ne temas pri tio, ke ni eniras la alt-teknologian revolucion — la ideo estas, ke vi prenu viajn malalt-teknologiajn kolorajn kraĵojn kaj mem bele kolorigu la familion tie. Ĉu ne pli bona propono ol liveri al vi luks-kolore presitan kovrilon sur multkosta rebrila papero? Per nia memserva propono, poste povos kuŝi tra la mondo pli ol kvar mil individue koloritaj bildoj — kaj neniu du la samaj. Eĉ la plej moderna tekniko ne povas liveri tian buntan abundon. Kaj la mezajn paĝojn ni denove donas al nia desegnisto Pavel, kiu siavice redonas ilin al vi por kompletigi per via kraĵnumado. Do, laboru kreive!

Pardonpeton mi ŝuldas al nia alia desegnisto, Pavel Majorov el Sovet-unio. Ni aperigis lian bildstrion sur paĝoj 4 kaj 5 de la pasinta numero, sed la pres-koboldo formanĝis lian nomon. Ni donos spacon al lia bildarto denove iam. Alia ĝustigo: niaj kantoj estas aranĝitaj de Franz-Georg Rössler, sed la muziknotojn desegnas lia edzino Rita. Ambaŭ kantigas vin denove ĉi-numere, ĉi-foje pri la somero, kiu por multaj legantoj survojas. Konstelacioj kaj karnavalo videblas krome, kune kun amaso da mallongaj kaj interesaj eroj de legantoj — unuafoje ni havas rakonton senditan de afrika leganto,

du erojn de amerikanoj kaj konkurson el Irano. Ni fermas nian gramatikan rigardon al -ig- kaj -iĝ-, kun danko al Claude Gaccond, direktoro de KCE, pro siaj spertoj kaj klarigoj, kiuj formas la bazon por nia ĉi-numera resumo.

Resume, bunta kaj kolorplena numero — eĉ pli kolora, se vi diligente laboros!

Ĉielarke salutas,

Stefan MacGill
8 feb. 1990

Nemzetközi esperantó diáknap. Megjelenik éventénegyszer. Ára: 10 ft. 90/2 szám, XVII évfolyam. Felelős szerk.: Schiller Judith. Kiadja a Magyar Esperantó Szövetség, Szentháromság tér 6, H-1014 Budapest. Felelős kiadó: Princz Oszkár. Készült a MESZ Sokszorosítottában: hearota 90-000 Kiad. eng. szám: III/IFJ/30/1976; ISSN 0230-1318.

Terjeszti a Magyar Posta. Elfizethető bármely hírlapkiélesztő postahivatalnál, a hírlapkiélesztőknél, a Posta hírlapüzleteiben és Lapellátási Irodánál (HELIR), Budapest, XIII, Lehel u. 10/a, 1900 – közvetlenül vagy postautalványon, valamint átutalással a HELIR 215-96162 pénzforgalmi jelzőszámra.

Ho, kion mi vidis!

Ho, kion mi vidis laste!

Kun du katoj kondukataj
kun kvar hundoj delikataj:
du – vestitaj, du – senvostaj,
tra strateto tre malvasta...

lerte trotis ino hasta.

Blazio VAHA.



filoj

Du virinoj prenis akvon el puto. Poste alvenis la tria. Maljunuleto eksidis sur ŝtoneto por ripozi. Jen diras unu virino al la alia: "Mia filo estas tiom lerta kaj forta – neniŭ venkos aŭ obeigos lin."

"Kaj mia tiom bone kantas, ĝuste kiel najtingalo." diris alia. Kaj la tria silentas.

"Kial, do, vi ne rakontas pri via filo?" demandas ŝin la najbarinoj.

"Kion do mi rakontu?" diras la virino: "Li havas nenion eksterordinaran."

La virinoj ĉarpis plenajn sitelojn da akvo kaj ekiris. La maljunuleto sekvas ilin. Iras la virinoj kaj fojfoje haltadas. Doloras la manoj, la akvo plaŭdas, doloregas la dorsoj. Subite tri knaboj alkuras por renkonti la virinojn. Unu knabo trans sia kapo kapiolas, tre lerte saltas. La virinoj admiras lin. La dua ekkantas najtingale – al li la virinoj fikse aŭskultas. La tria alkuras sian patrinon, prenas de ŝi la pezajn sitelojn kaj ekportas ilin. La virinoj demandas la maljunuleton: "Nu, kion? Kiel plaĉas al vi niaj filoj?"

"Sed kie do ili estas?" respondis li: "Mi vidas nur unu."

*Valentina Osejeva
Tradukis el la rusa NikSt,
Moskvo (junio 89)*




SOMERA KANTO

(Germana popolkanto)

Traduko kaj
muzika aranĝo:
Franz-Georg Rössler



Ĝoj-e--gon la- so-mer-sezon' al-portas al la mond'.
Vek-i--ĝas ĉi---e gaja ton'. En foli-ar' kaj frond'



kant--adas tra la ar-bo-hal' kun be-la, he---la voĉ'-



la sin--jor-in--o najtingal' sen-fine, sen ri--proĉ'.

Akompanaĵo obstineca

(Piano aŭ gitaro)



(g/h)

EL AMERIKO, EL DU GENERACIOJ

La porkino kaj ĝia fratino

Iam en Kotlando estis porkegino, kiu havis du porkidinojn. Iun tagon la du porkidinoj vagis for de sia patrino. Ili baldaŭ perdiĝis. Eĉ pli malbone, ili disiĝis unu de la alia. La pli aĝa fratino komencis serĉi sian fratineton. Survoje ŝi vidis virbovon kaj ektimis pro ĝi. La virbovo vidis ŝin kaj ekpostkuris ŝin. Ĉar li ne zorge atentis la vojon li falis en lagon da koto. Post kiam ŝi regajnis la spiron, la porkinido serĉis denove sian fratineton. Subite ŝi esploris, kiam ŝi vidis la fratineton kuŝantan en la koto. Pro ĝojo ili frotis nazojn kaj ludis en la koto.

*Crystal Rowe (12-jara)
Markham, Ilinojso, Usono*



Laŭ la regularo

Kiam mi estis en la aerarmeo dum la Dua Mondmilito, mi estis postenata en la aerbazan ĉe Bangor, Maine (*Bengor, Mejn*), Usono. Estis malvarme tie dum la vintro kaj estis multe da glacio sur la stratoj. Ankaŭ estis lokoj en la stratoj iom montetaj. Unu fojon, aŭtomobilo kun kvar oficiroj ne povis supreniri malgrandan monteton pro la glacio sur la strato. La oficiroj eliris el la aŭto kaj puŝis ĝin. Kiam ili preskaŭ atingis la supron de la malgranda monteto, soldatoj alvenis por helpi ilin. Kiam la soldatoj alproksimiĝis, ili salutis la oficirojn. La oficiroj redonis la saluton, sed kiam ili faris tion ili devis forpreni la manojn de la aŭto, kaj ĝi glitis malsupren al la malsupro de la monteto!


Evaristo García, Usono.

KIAL HOMOJ MORTAS

Iam la homoj de la mondo mortis en grandaj nombroj. Neniu estis feliĉa pro tio, sed neniam medikamento povis malebligi la mortadon. La homoj sur la tero parolis nur pri la morto. Iun tagon ili kunvenis por preparoli kion oni faru kontraŭ tiu katastrofo. Oni decidis sendi du kurierojn al Dio, s-ron Hundo kaj s-ron Testudo. Ĉar s-ro Hundo sciis rapide kuri, li devis iri al Dio kaj peti, ke estu permesate reveni al la vivo post la morto, kaj s-ro Testudo devis peti, ke la homoj ne revenu post la morto.

Ili forvojaĝis en la sama tago. S-ro Hundo estis kompreneble multe pli rapida ol s-ro Testudo. Survoje tamen s-ro Hundo vidis kelkajn homojn, kiuj kolektis palmonuksojn kaj tiu afero allogis lin. Li haltis kaj eklekis la oleon, kiu fluis el la nuksoj; fine li ekdormis surloke. Intertempe s-ro Testudo pasis lin kaj atingis unue la ĉielon. Tie li plenumis sian devon kaj parolis kun Dio. Kiam s-ro Hundo vekigis, li fulmrapide kuris supren, esperante renkonti Dion antaŭ s-ro Testudo. Sed kiam li alvenis, li rimarkis, ke s-ro Testudo jam liveris sian mesaĝon kaj nun ripozas. Li ankaŭ diris al Dio, kion li devis diri, sed Dio respondis: "Mi bedaŭras diri, ke mi jam akceptis la unuan peton, ke la homoj ne revenu al la vivo post sia morto... vi alvenis tro malfrue." Tial do la peto de s-ro Hundo ne estis akceptita: post tiu tempo, kiam persono mortas, li ne plu revenos al la vivo.

*Charles D. Ezebingaya,
Zamenhof Esperanto-Grupo
P.O. Box 99, Oweri, Ino State,
Nigerio.*



VORTKLARIGOJ

nenia: neniu-speca
medikamento: re-san-ig-ilo
kuriero: mesaĝ-portanto
palmo: tropika arbo
nukso: solida frukto kun ligneca ekstera ŝelo, foje kun olea enhavo
liveri: transdoni

KARNAVALA AVENTURO



”Ho, mi jam antaŭguas la hodiaŭan karnavalan vesperon”, mi diris al mia frato: ”En granda, bunte ornamita kaj lumigita salono, inter multaj maske vestitaj homoj, ne plu rekoneblaj pro la maskerado, ni povos ĝui amuzan muzikon. Sed kiel vesti nin en tiu ĉi jaro? Volonte mi rolus kiel princino, dancistino, kun bela robo, oraj ŝuoj, diversaj ornamaĵoj, ruĝaj lipoj kaj bele aranĝita hararo. Sed kio pri vi? Ĉu vi preferas esti klaŭno aŭ vakero, rabisto aŭ ŝejko?”

”Mi ankoraŭ ne scias,” li respondis: ”sed ni povas iri en la kelon kaj al nia granda ŝranko. En ĝi troviĝas multaj aĵoj, kiuj eble povos helpi nin.”

Ni kune iris en la kelon. Estis iom malhele pro la nuba ĉielo kaj pro la malgrandaj fenestroj. Mia frato ŝaltis la lumon. Mi malfermis la grandan pordon de la ŝranko. Serĉante mi disŝovis malnovajn jakojn kaj robojn, alproksimiĝis kun la nazo al la vestoj kaj diris: ”Strange, en nia ŝranko mi flaras cigaredan fumon. Ĉu vi povas imagi, de kie ĝi venas?” Mia frato diris nur: ”Certe vi havas tro delikatan flarsenton; kial povus esti fumo en nia ŝranko?”

Mi ŝovis flanken aliajn vestojn kaj jen! ... terure! ... ŝokite mi ekkriegis! ... Frape mi fermis la pordon de la ŝranko, tiris mian fraton el la kelo antaŭ ol li povis demandi, kio okazis.

”Kio estas? Diru al mi, diru!” li insistis.

”En la ŝranko sidas viro.” voĉe kaj korpe tremante, mi balbutis.

”Ĉu viva aŭ morta?” li demandis.

”Viva, viva!” mi respondis: ”Mi vidis liajn okulojn. Li grandokule rigardis min.”

bunta: vikle mult-kolora
masko: falsa vizaĝo
maskerado: maska festo
vakero: nord-amerika brutogardisto
ŝejko: araba tribestro
kelo: subtera ĉambro
disŝovi: puŝi dis
flari: senti per la nazo
insisti: havi fortan volon
balbuti: paroli hezite
intenci: plani
ladujo: skatolo el lado, kutime kun manĝaĵoj ene
migri: promeni sporte aŭ por ĝuo
ganto: vesto por la mano
mantelo: palto
eskapi: forkuri

Haste ni kuris al la patrino. Ŝi tuj telefonis al la policejo. Du policanoj rapide venis. Ili iris en la kelon, kaj tie vidis ne nur malfermitan ŝrankon, sed ankaŭ malfermitan fenestron. Ili kontrolis la kelon. "Bedaŭrinde, la viro jam eskapis." ili konstatis. En la sama momento mi malkovris nian grandan dorsosakon, plenigitan de diversaj aĵoj.



"Kion signifas tio? Ĉu vi pakis ĝin? Ĉu vi eble intencis ferii?" la policanoj demandis. "Tute ne." ni respondis kaj kune ni elprenis ĉion, kio estis en la dorsosako: aer-matraco, gaso-kuirilo, manĝaĵoj, laduoj, vestoj, migraj ŝuoj, gantoj, pluvo-mantelo kaj aliaj aĵoj.

La policanoj notis ĉion. "Vi havis grandan bonŝancon," unu el ili diris: "la ŝtelisto volis atendi la nokton kaj poste eskapi kun viaj aĵoj. Nu, sen viaj materialoj li ne longe eltenos. Certe ni baldaŭ kaptos lin."

Vespere, eĉ dum la plej distraj momentoj de la karnavala vespero, mi vidis la okulojn de la ŝtelisto antaŭ mi. Ĉu li eble same timis, kiom mi?

*Rita Rössler,
FR Germanio.*



Konkurso de La Laŭta Vekhorloĝo

Fine de 1988 aperis legolibro de via redaktoro La laŭta vekhorloĝo kun kvar rakontoj kaj multaj ekzercoj. Dek el tiuj ekzercoj formis konkurson por la legantoj kaj mi promesis anonci la rezulton de tio en Juna amiko komence de 1990. La du gajnintoj estas S-ino Margaret Trethowan el Chippenham, Britio kaj d-ro Otto Kaczinski el Havelberg, Germana DR.

Konkursoj de Juna amiko

Ĝojadu pro kvindek numeroj de la unika lernejana gazeto 'Juna amiko'. Jen la solvo de la konkurso el numero 89/3. Ni ricevis 16 solvojn. Gajnis la premiojn por la junuloj 10-jara Aleksandar Jakovljevic el Smederevo, Jugoslavio kaj 14-jara Sergej Lizunov el Omsk, Sovet-unio. Gajnis la trian premion la 20-jara Marcos Cruz el Madrido, Hispanio.

Matematikaj tem-atakoj altiris 22 respondojn — bone! Gajnis premiojn la 12-jara Helga Berecz el Novaj, Hungario. (Jes, la vilaĝnomo estas Esperanta vorto!) kaj Caio Matos el Valadares, Brazilo.

Estas agrable loĝi en bela domo estas la kaŝfrazo de la konkurso en numero 89/4. Ni ricevis nur dek respondojn. Gajnis 13-jara Dmitrij Naumov el Poltava, Sovet-unio kaj la diversaga anaro de la klubo 'Tondro' el Jonava, Litovio.

La lokomotiva ranĝado el 89/2 tiris nur du respondojn, ambaŭ detalajn. Gajnas Ingeborg Hein, Sernow, Germana DR. Gratulojn al ĉiuj gajnintoj kaj dankon al ĉiuj konkursintoj!

Ĉielaj ursoj kaj alkoj

Mitoj pri la origino de du stel-figuroj

La mitologio kaj la steloj

Dum la longa historio de la homo, popoloj en diversaj partoj de la mondo, rigardante la sennuban noktan ĉielon, uzis sian imagpovon por vidi formojn de homaj estuloj, bestoj kaj objektoj, kiujn sugestis al ili grupoj da steloj. Plej ofte tiuj stelaroj aŭ konstelacioj prezentas rolantojn en la mitologio de la popoloj. Sammaniere kiel estis kreitaj la mitoj mem, rakontoj estiĝis por klarigi, kiel tiuj figuroj atingis sian pozicion sur la ĉiela volbo.

Etnografoj – sciencistoj okupiĝantaj pri la esploro de scioj, kutimoj, kredoj kaj folkloro de diversaj homaj socioj – kolektas faktojn ankaŭ pri la nomoj kaj signifoj de la stel-figuroj. Evidentas, ke homoj apartenantaj al diversaj kulturoj ne vidas la samajn bildojn sur la firmamento; t.e. ili ne grupigas stelarojn en identa maniero. Eĉ se temas pri la samaj konstelacioj, la figuroj kaj rakontoj pri ili povas varii.

Ni komparu la mitologian devenon de du bone konataj stelaroj sur la norda stela firmamento laŭ la interpreto de du tre malsamaj kulturoj: la unua estas la antikva helena civilizo de Eŭropo kaj la dua estas la kulturo de la finnugraj popoloj loĝantaj en la norda Siberio. Laŭ la oficiala latinlingva nomenklaturu uzata de astronomoj, la konstelacioj nomiĝas *Ursa Maior* (UMa) kaj *Ursa Minor* (UMi). Ili signifas 'La Granda Ursino' kaj 'La Malgranda Ursino' respektive, kaj similaj tradukitaj nomoj troviĝas en pluraj eŭropaj lingvoj. Bildo 1 montras, kiel la steloj de la Granda Ursino situas sur la ĉielo; la punktita linio helpas imagi, kiel aspektas la formo de la besto.

Rimarku, ke la sep steloj en la kapo kaj kolo de la ursino havas tre karakterizan formon, kiu ĉe kelkaj popoloj ricevas apartan nomon: La Granda Ĉerpilo, La Ĉaro (de Karlo, t.e. Karolo la Granda), La Plugilo. Tuj apud la ĉiela nord-



poluso troviĝas alia grupo da sep steloj, kiuj estas aranĝitaj same kiel la sep plej gravaj steloj de La Granda Ursino; tiu ĉi konstelacio estas La Malgranda Ursino aŭ La Ursido. Bildo 2 venontpaĝe montras la formon.

La helena mito pri Kalistoa kaj Arkaso

La eventoj en la mito disvolviĝis antaŭ tre longa tempo en Arkadio, arbarriĉa montara regiono de Peloponezo en Helenujo. Tie vivis reĝo Likaono, kiu havis tre belan filinon, la nimfon Kalistoa. La reĝidino estis akompanantino de

la virga Artemisa, la diino de la ĉaso kaj ĉasteco. Pro tio Kalistoa devis ĵuri al Artemisa, ke ankaŭ ŝi neniam amos viron.

Tamen, iun varman someran posttagmezon, dum Kalistoa dormis sub arbo en arbaro, Zeŭso, la reĝo de la dioj, ekvidis ŝin kaj enamiĝis al ŝi. Memorante sian promeson al Artemisa, Kalistoa unue ne akceptis la amon de Zeŭso, sed poste ŝi cedis al li. Kiam la virgulinaj de Artemisa eksciis pri la amafero inter Kalistoa kaj Zeŭso, ili rifuzis ĉasi kaj ludi kun ŝi. Kalistoa, do, devis vagadi sola en la senhomaj arbaroj de Arkadio, kie troviĝis nur sovaĝbestoj. Tie ŝi naskis knabeton, kiun ŝi nomis Arkaso.

Kiam Hera, la edzino de Zeŭso, informiĝis pri la rilato inter sia edzo kaj la bela nimfo, ŝi venis surteren plena de kolero kaj malbenis Kalistoan. Tiu ĉi tuj transformiĝis: defalis ŝiaj principaj roboj; ŝiaj brakoj kaj kruroj dikiĝis kaj kovriĝis de vila hararo; longiĝis ŝia vizaĝo, ĝis ĝi akiris la formon de muzelo. Ankaŭ la voĉo de Kalistoa ŝanĝiĝis; ŝi komencis muĝi kiel urso.


Arkaso, la fileto de Kalistoa, ne plu konis sian patrinon, do li forkuris de la ursino kaj iris en la kamparon, kie li estis adoptita de bonkora farmbienulo. Kalistoa ne povis sekvi la knabeton sed devis kaŝi sin en la arbaro por eviti la ĉasistinojn de Artemisa, siajn antaŭajn kompaninojn.

La elkreskinta Arkaso, kiu heredis la ĉasad-leritecon de sia patrino, kutimis iri en arbarojn kun pafarko kaj sagoj por serĉi sovaĝbestojn. Iun tagon, kiam li estis en la arbaro, kie Kalistoa kaŝis sin, ŝi vidis lin kaj, ĝoje muĝante, kuris al li por ĉirkaŭpreni lin. Pensante, ke la ursino volis ataki lin, Arkaso ekstreĉis sian arkon, sed Zeŭso, kiu vidas ĉiujn farojn, venis por savi Kalistoan. Li ekkaptis la ursinon ĉe la vosto kaj ĵetegis ŝin inter la stelojn. Poste, por ke Kalistoa neniam estu ankoraŭfoje apartigita de sia filo, Zeŭso ĵetis ankaŭ Arkason sur la ĉielon. Tiel ili fariĝis la stel-figuroj de La Granda Ursino kaj La Ursido.

La finnugra mito pri la ĉaso kontraŭ la kosma alkino

En parto de la nordsiberia regiono loĝata de finnugraj popoloj, la konstelacio, kiu en Eŭropo estas konata kiel La Granda Ursino, havas la nomon Hēglun aŭ Hēglun, la kosma alkino, kaj La Malgranda Ursino rolas kiel la alkido de Hēglun. Tie oni kredas, ke la videbla blua ĉielo estas la tajgo — speco de subarkta konifera arbaro — de la supra mondo, kie loĝas la kosma alkino. Dumtage ŝi kaŝas sin en la densejoj de la ĉiela tajgo kaj nokte ŝi elvenas sur la montopintojn kaj tiel povas esti vidata de homoj sur la tero.

Tri ĉasistoj kur-sekvas la alkinon sur la neĝo de la tajgo. Ili kverelas, pri kiu estas la plej bona ĉasisto, kaj fine decidas, ke tiu, kiu la unua kur-atingas la al-



kinon kaj mortigas ŝin, estas la plej bona. Ĉar ne temas pri ordinara alkino sed pri ĉiela besto, estas malfacile kapti ŝin. La ĉasistoj kuras tra la meza mondo kaj eniras la supran mondon, kie la alkino kun sia alkido paŝtiĝas sur la tajgo. Tie estas ludata la dramo de la kosma ĉaso.

Se ni rerigardas la stel-grupon de La Granda Ursino, ni vidos, ke la nord-siberiaj popoloj interpretis ĝin alie ol la helenoj. La unuaj kvar steloj, kiuj troviĝas en la kapo de La Ursino, laŭ la finnugra mito estas Ĥelgun, la kosma alkino, kaj la postaj tri prezentas la ĉasistojn. Ĉekape kuras nelacigebla evenko, malantaŭ li venas keto, peza kaj mallerta fiŝisto, kaj la lasta estas ruso, malsperta pri la tajga ĉirkaŭaĵo. Sekvas tiun grupon la sep steloj de la alkido.

Ankoraŭ unu tre grava elemento aperas en la finnugra rakonto — La Lakta Vojo — kiu estas la spuroj de la skioj de la ĉasistoj. La evenko estis la unua, kiu trafis la alkinon, kaj li mortigis ŝin, tiel superante la aliajn du ĉasistojn. La sekvan nokton, la alkido, kiu vere estas alkidino, elvenas kun sia ido el la densejo de la ĉiela lando, kaj la sceno de kosma ĉasado estas ripetita laŭ la sama sinsekvo de eventoj.

Variaĵoj de la mito

Keklaj nord-siberiaj popoloj rakontas variaĵojn de la mito kaj tiel iom alimaniere klarigas la signifon de la sep steloj troviĝantaj en la konstelacio.

A: Iun tagon tri ĉasistoj preparis sin por la ĉaso. La unua, kiu estis fanfaronulo, diris, ke li ĉiam estas la unua, kiu atingas la alkinon. La dua, la kaldronportanto, devis porti la poton kaj kuiri la viandon, dum la tria, la plej malgranda, diris: "Mi estas tre malforta. Mi trenos min malantaŭe." Kiam ili vidis la alkinon, la fanfaronulo ektimis kaj kuris malantaŭ la aliajn; la potportanto iris en la mezon, dum ĉefronte restis la plej malgranda ĉasisto. Tiel ili restas ĝis la nuna tago, postkurantaj la ĉielan alkinon.


B: Iun tagon la giganto Ĉangit sur skioj ĉasis la ĉielan alkinon kaj fortranĉis ŝian kapon kaj voston per buĉ-tranĉilo. La resto de la ĉiela arkino — la korpo kaj kruroj — estis ŝanĝitaj en konstelacion, kaj la spuroj de la skioj de Ĉangit, lasitaj en la naĝo, fariĝis La Lakta Vojo.

C: Iun tagon la heroo Ĉakiptilan deziris mortigi la ĉielan alkinon. Li kursekvis ŝin kaj ekpafis sagon, kiu falis ĉe la piedoj de la alkino. Ekŝeri, la mastro-spirito de la supra mondo, haltigis Ĉakiptilan, ĉar li volis mortigi la ĉielan alkinon, kaj igis lin putri sur sia loko. La unuaj kvar steloj de la konstelacio estas la alkino, la sekvaj tri estas ŝia ombro, kaj malgranda stelo ĉe la dekstro de la malalta stelo estas la sago de Ĉakiptilan. La Lakta Vojo estas la skispuro de la giganto, dum inter La Lakta Vojo kaj La Granda Ursino estas malgranda grupo da steloj figuranta la poreterne putrantan Ĉakiptilan.

ĉerpilo: kulerego
muzelo: besta nazego
evenko, keto: etnoj en Siberio
alko: norda cervo

Bernard Golden, Veszprém, Hungario


INKLUDU KUN NI



1. Se oni miksas bluan kun flavo, kio rezultas?
2. Se oni miksas ruĝon kun flavo, kio rezultas?
3. Se oni miksas ruĝon kun blanko, kio rezultas?
4. Se oni miksas ruĝon kun bluo, kio rezultas?
5. Se oni miksas nigron kun blanko, kio rezultas?
6. Se oni miksas flavon, ruĝon kaj nigron, kio rezultas?
7. Se oni miksas ĉiujn kolorojn, kio rezultas? (Vidu respondojn sur paĝo 23)

Prenu kolorajn kraĵonojn kaj kolorigu la bildon. Kelkfoje du koloroj kunfluas.

1. Kiukolora estas ①?
2. Kiukolora estas ②?
3. Kiukolora estas ③?
4. Kiukolora estas ④?
5. Kiukolora estas ⑤?
6. Kiukolora estas ⑥?
7. Kiukolora estas ⑦?



ĉiel-kolora:

sun-kolora:

sang-kolora:

neg-kolora:

1. Kiu botelo falas?
2. Kiu botelo rompiĝas?
3. Kiu sidas?
4. Kiu falas?

5. En kiu botelo ne plu estas inko?
6. Kiu tenas sian botelon per nur unu mano?

7. Kiu koloro estas la plej bela?
8. Kiu persono estas la plej bela?
9. Kiujn kolorojn vi uzus por beligi vian dormo-ĉambron?

1. Kiukolora estas la suno?
2. Kiukolora estas freŝa herbo?
3. Kiukolora estas sennuba ĉielo?
4. Kiukolora estas lakto?
5. Kiukolora estas sango?
6. Kiukolora estas ĉokolado?
7. Kiukolora estas karbo?
8. Kiukolora estas via nacia flago?

	UNU-LIGAJ VERBOJ (netransitivaj)	UNU-LIGAJ VERBOJ (netransitivaj)	DU-LIGAJ VERBOJ (transitivaj)
	Movo al stato (ek-)	Verboj de stato (korpaj)	Kaŭzi la staton
A	<p>La bebo sidiĝas Mi kuŝiĝis antaŭ horo. Nova leĝo stariĝis. Kia bruo! La preĝantoj genuiĝas. Paf! La soldatoj subite kaŭriĝas.</p>	<p>La bebo sidas. Mi nun kuŝas en la lito La leĝo nun staras (ekzistas) Kia silento! La preĝantoj genuas. Nun ili daŭre senmove kaŭras.</p>	<p>Panjo sidigas la bebon Panjo malkuŝigos min matene. La registaro starigis la leĝon. La pastro genuigis ilin. La pafado kaŭrigis ilin.</p>
	Movo al stato (ek-)	Verboj de stato (kreitaj)	Kaŭzi la staton
B	<p>La vetero varmiĝas. La manĝo pretiĝas. La teleroj puriĝas. (<i>estis malpuraj, baldaŭ estos puraj</i>) Antaŭ unu jaro li soldatiĝis. (<i>ekestis soldato.</i>) Ili amikiĝis dum la tendaro. La fiŝoj ariĝas. La protestantoj disiĝas. Mia laboro pliiĝas. La esperantistoj kuniĝis. La bileto enpoŝiĝas. (<i>eniras poŝon</i>) La ĉambro senpolviĝis. La aviadilo surteriĝis.</p>	<p>La vetero varmas (= estas varma) La manĝo pretas (= estas preta) La teleroj puras (= estas puraj) Li soldatas (= estas soldato) Ili amikas (= estas amikoj) La fiŝoj aras. La protestintoj disas. Do, mia laboro nun plias (= estas pli). Nun, ili kunas (= estas kunaj) La bileto enpoŝas. (= estas en poŝo) La ĉambro senpolvas. La aviadilo surteras.</p>	<p>Mi varmigas la akvon. Mi pretigas la manĝon. Paĉjo purigis ilin. (<i>kaŭzis, ke ili estu puraj</i>) La armeo soldatigis lin. (<i>devigis lin esti soldato</i>) La sorto amikigis ilin. La ŝarkoj arigis ilin. La polico disigis ilin. La instruisto pliiĝis mian laboron. La kongreso kunigis ilin. Mi enpoŝigis la bileton. (<i>mi metis ĝin en poŝon.</i>) Mi senpolvigis ĝin. La piloto surterigis ĝin.</p>

UNU-LIGAJ VERBOJ		DU-LIGAJ VERBOJ (transitivaj)
C	Verboj de ago: okazas io.	Kiu kaŭzis la agon? Kiu okazigis ĝin?
	<p>La akvo bolas. La pluvo ĉesis. Ni venis al la parko. La knabo kuras. Okazis akcidento. Aperis kuniklo. La almozuloj foriris. La eksperimento evoluas.</p>	<p>Mi boligas la akvon. Ĉu Dio ĉesigis la pluvon? La cirko venigis nin. La leono kurigis lin. Ebriulo okazigis la akcidenton. Magiisto aperigis la kuniklon. La polico foririgis ilin. La sciencisto evoluigas ĝin.</p>
Ĉ	<p>La bildo vidiĝas. La leciono komenciĝis. La melodio kantiĝas. (= estas kantata) La banano manĝiĝas. (= estas manĝata)</p> <p>La paltoj surmetiĝis. La studento diplomigiĝis.</p> <p>La muso ĉasiĝas. La virino puniĝas. Rakonto verkiĝis.</p>	<p>Mi vidas la bildon. La instruisto komencis la lecionon. Ni kantas la melodion.</p> <p>Mi manĝas la bananon.</p> <p>Ni surmetis niajn paltojn. La universitato diplomis la studenton.</p> <p>La kato ĉasas la muson. La policisto punas la virinon. Mi verkis rakonton.</p>



TRI-LIGAJ VERBOJ (transitivaj)
 (Kiu aŭ kio kaŭzis, ke iu faru ion?)

La instruisto vidigas ĝin al ni.
 La lernejestro komencigis la lecionon.
 La instruisto kantiĝas la melodion
aŭ: La instruisto kantiĝas la infanojn.
 Mi manĝigas la bananon al la bebo.
aŭ: Mi manĝigas la bebon.
aŭ: Mia malsato manĝigis min.
 Panjo surmetigis la paltojn. (Ŝi ordonis)
 La ŝtato diplomigas la studentojn
 pere de la universitato.

Ĝia agresemo ĉasigas la katon.
 Ŝia misfaro punigas ŝin.
 Konkurso verkiĝis min.
aŭ: Konkurso verkiĝis la rakonton.

Finlîgas la klarigo pri -ig- kaj -iĝ-

Tra la lasta jaro ni prezentis klarigojn, rakontojn kaj ekzercojn pri la finaĵoj -ig- kaj -iĝ-, kiuj estas tre gravaj en Esperanto, ĉar ili malfermas al ni la verban strukturon de la lingvo kaj permesas al ni uzi kaj manipuli ĝin en tre kreiva maniero.

Ni ne volas aperigi longan teorian artikolon ĉi tie; tio aperos en venonta numero de la revuo por instruistoj *Internacia Pedagogia Revuo*, kie ni aperigos similan tabelon, sed kun aliaj ekzemploj kaj detalaj klarigoj. La tabelo ĉi tie volas helpi vin, la lernantojn, rekte.

Verboj en Esperanto estas de du bazaj specoj. Ili estas netransitivaj (ntr.), tio estas unu-ligaj, aŭ transitivaj (tr.), tio estas du- aŭ tri-ligaj.

Stari estas unu-liga verbo: Policisto staras.

Aresti estas du-liga verbo: Policisto arestas ŝteliston.

Sendi estas tri-liga verbo: La policisto sendas la ŝteliston al la juĝejo.

Ĝenerala regulo: -IG- aldonas unu ligan al verbo.
-IĜ- forprenas unu ligan de verbo.

-IG- donas la signifon de kaŭzo.

Se ni aldonas -IG- al netransitiva (unu-liga) verbo ni ŝanĝas ĝin al du-liga verbo, kaj ni povas indiki la faranton de la ago. Tion ni vidas en fakoj A, B kaj C.

Se ni aldonas -IG- al transitiva (du-liga) verbo ni ŝanĝas ĝin al tri-liga verbo. Ĝia subjekto nun indikas ne la faranton de la ago, sed tion aŭ tiun, kiu kaŭziĝis, ke la faranto faru la agon. Tion vi vidas en fako Ĉ.

-IĜ- donas la signifon de ekesto aŭ okazado.

Se ni aldonas -IĜ- al transitiva du-liga verbo, ni ŝanĝas ĝin al unu-liga verbo. Ne plu *Iu faras ion*, sed *Io fariĝas*. Alivorte, informi pri la faranto ne plu tre gravas, pli grave estas, ke la ago okazas kaj havas rezulton: *La laboristoj konstruis ponton. La ponto konstruiĝis*. La dua frazo signifas, ke ne multe interesas nin, kiu konstruis la ponton; pleje gravas, ke la ponto nun staras kaj estas uzebla. Tion vi vidas en fako C.

Se ni aldonas -IĜ- al netransitiva verbo indikanta staton, la nova verbo restas unu-liga, kaj eĉ retenas la saman subjekton. En fako A, temas pri verboj de korpa stato (staras) kaj la -iĝ- formo indikas movon al tiu stato (stariĝas). En

fako B temas pri kreitaj verboj de stato, kaj la iĝ-formo indikas ŝanĝon, kiu rezultas en tiu stato. *La ĉielo bluiĝas.*, t.e. estis griza, sed iom post iom ĝi ekestas blua.

Ni normale ne uzas -iĝ- kun netransitivaj verboj, kiuj signas agojn, t.e. tiuj en fako C. Se ni tion farus, la senco estus *ek-* kaj estas pli bone uzi tiun prefikson: La knabo ekkuras. La akvo ekbolas. Simile kun la unu-ligaj verboj formitaj en A per -iĝ-. Se vi volas indiki la komencon de tiu ago, uzu *ek-*: La bildo ekvidiĝis.

Atentu pri fako B!

Vi rajtas formi tiujn verbojn de stato el adjektivo, substantivo, ktp., nur se ne jam ekzistas verbo el tiu radiko kun pli specifa kaj aktiva signifo, ekz.:

De *truo* vi ne rajtas krei verbon *trui* = *esti truo*.

De *diplomo* vi ne rajtas krei verbon *diplomi* = *esti diplomo*

De *konfuza* vi ne rajtas krei verbon *konfuzi* = *esti konfuza*

ĉar de tiuj radikoj jam ekzistas verboj:

Trui estas transitiva verbo kun signifo: *fari truan en*

Diplomi estas transitiva verbo kun signifo: *doni diplomon al*

Konfuzi estas transitiva verbo kun signifo: *malsimpligi* aŭ *kaŭzi konfuzon*.

Tiuj verboj, kaj pluraj similaj, do, apartenas al fako C kaj ni diras:

La konduktoro truis niajn biletojn; ili truiĝis.

La profesoro diplomis la studentojn; ili diplomiĝis.

Mi esperas, ke mi ne konfuzas aferojn por vi.

Vane vi protestas, ke via vortaro indikas, ke *tru-* kaj *diplom-* estas substantivaj kaj ne verbaj radikoj. Tio ne estas la testo. La testo estas: ĉu entute ekzistas verbo de tiu radiko. Se jes, tiu verbo havas specifan signifon, kaj estas transitiva aŭ ne-transitiva, kaj tiuj kriterioj regas la uzon de -ig- kaj -iĝ-, do en fakoj C aŭ Ĉ.

Mi esperas, ke tiu superrigardo helpas vin. Kiu interesiĝas pri la temo pli detale, abonu la revuon *IPR* kaj legu la pli detalan artikolon!

en la task' ni ne rezIGnu,
pro l'defi' vi ne indIGnu,
sIGNifon vIGLe sed rIGore,
lIGu kun la skem' plenkore.

La saĝa juĝisto

La malgranda knabo Joĉjo vivis solece kun sia patrino. La patro mortis juna, do la patrino kaj Joĉjo restis sen apogo. Ili vivis malriĉe, sed feliĉe. La patrino entreprenis diversajn laborojn, eĉ bakis flanojn el grio, kiujn vendis la mandgranda Joĉjo en la foiro. Ĉi tiel ankaŭ Joĉjo helpis sian laborantan patronon. El ilia vilaĝo iu fripono jam delonge enviis ilian modestan, feliĉan vivon. Li ĉiam embuskis la foiron, kiun Joĉjo vizitadis.

Dum la somero, post sukcesa foiro, Joĉjo ekiris hejmen. Estis varmega vtero. Joĉjo estis laca kaj dormema. Li serĉis ombran lokon apud la vojo por ekdormi. Li trovis konvenan lokon kun ŝtonego. Li metis sian grio-sakon sur la ŝtonegon, kuŝigis sian kapon kontraŭ ĝin kaj tuj ekdormis.

La fripono, kiu jam delonge sekvis la knabon, ridete eltiris la sakon de sub la kolo de Joĉjo. La ŝtelisto sciis bone, ke la grio-sako nun enhavas nek grion, nek flanojn, sed ses florenojn, kiujn ricevis la knabo pro la venditaj flanoj. La fripono forrapidis. Malfrue posttagmeze vekiĝis Joĉjo. Li tuj konstatis, ke iu forŝtelis la sakon. La knabeto plore kuris en la vilaĝon por fari plendon kaj rakonti ĉion al la juĝisto, kiu tuj vokis la vilaĝanojn kaj okazigis proceson.

”Ĉu vi vidis tiun, kiu forŝtelis vian sakon?” demandis la juĝisto.

”Mi vidis neniun, ĉar mi dormis ĉe la ŝtonego.” respondis Joĉjo.

”Tiukaze, la ŝtonego mem devas esti la ŝtelisto. Ĝi ricevos la bastonan batopunon!” verdiktis la juĝisto.

VORTKLARIGOJ

apogo: helpo

grio: muelita greno

flano: plata pat-kuko

foiro: vendo-placo

fripono: knab-aĉo

envii: jaluzi

embuski: kaŝe rigardi

floreno: mon-unuo

plendi: esprimi malkontenton

proceso: juĝa kunveno

verdikto: juĝa decido

absurda: stranga, malsaĝa

kondamni: juĝi kulpa

pokalo: ornama ujo

kuŝigi la kapon: movi la kapon al kuŝa pozicio

vekiĝi: ekesti veka aŭ esti vekata

vidiĝi: esti vidata

arestigi: kaŭzi areston

Estis granda ridado en la juĝejo pro la absurda verdikto. La juĝisto ekkoleris: ”Mi kondamnas ĉiun, kiu priridis la juĝistaron.” Li malkovris akvoplenan pokalon: ”Ĉiu, kiu ridis, venu unu post unu kaj punpagu. Ĉiu ĵetu unu florenon en la pokalon.”

Estis granda silento. Unu post unu la vilaĝanoj venis kaj pagis. Kiam la sesa persono ĵetis florenon en la akvon, vidiĝis grio-ringoj sur la surfaco de la akvo.

La saĝa juĝisto tiel arestigis la ŝteliston.

*Laŭ traduko de
Sandor Termes, Hungario*

Agnesa rakontas pri TINTILO

Mi estas dek-jara. Mi estas ano de la internacia infana teatro de danco kaj kanto TINTILO. Mi devas multe labori. Krom la lernado en elementa lernejo mi havas okupojn en nia ensemblo 3-foje semajne, po ĉ. 3 horojn. En ĉiu semajno mi krome partoprenas lecionon pri religio kaj ankaŭ pri fremda lingvo.

Mi tion eltenas, kvankam mi ofte estas laca, ĉar mi ege ŝatas danci kaj kanti. Mi neniam volus ĉesi iradi al niaj teatraj okupoj. Ĉiuj infanoj, kiuj estas anoj de nia ensemblo devas ankaŭ lerni Esperanton. Ni konfesas, ke lecionoj de tiu internacia lingvo ĝojigas nin, ĉar ili estas gajaj, variaj kaj enhavas multajn ludojn kaj kantojn.

Nia teatro TINTILO apartenas al la varsovia kvartala kulturdomo Mokotów. Ni posedas tie oportunajn salonojn por ekzerci kun niaj instruistoj. La ĉefo de nia ensemblo estas nia reĝisorino, ni havas ankaŭ muzikiston, paron da junaj dancistoj kaj sinjorinon, kiu instruas Esperanton. En nia teatro estas infanoj de 4- ĝis 12-jaraj. Ni jam ofte elpaŝis antaŭ pola kaj Esperanta publiko, krome ni partoprenis en televidaj elsendoj por infanoj.

Ni kantis multajn kanzonojn polajn kaj eksterlandajn, ni prezentis fabelon 'Bestofestivalo' kaj rok-operon 'Clown-down' en du lingvoj kaj ni multe dancis. Nun ni preparas novan programon.

Ni revas pri eksterlandaj vojaĝoj. Eble ni forveturos printempe al Sovetunio. Mi estas tre scivola, kiel aspektas la mondo kaj la vivo de ĝia loĝantaro.

Pro tiuj kialoj, mi estas feliĉa estante ano de nia ŝatata teatro TINTILO.

*Verkis Agnesa kun la helpo de la instruistino Teresa Jankowska
ul. Iwicka 40 m. 18, PL-00-735 Warszawa, Pollando*

NOVA KASETO:

Mesio de Handel

Kantas en Esperanto fragmentojn el la mesio la Universitata Koruso de la Centra Artensemblo de KISZ; muzikas la kamerorkestro de la Hungara Ŝtata Koncertensemblo en koncerto aranĝita de Hungara Esperanto-Asocio.

Kantistoj: Ibolya Verebics, Éva Pánczél, Béla Szilágyi, László Márk. Dirigento: Gábor Hollerung. Arta gvidanto: Gábor Bohus. Tradukinto: Imre Szabó.

Eldonis: LINGVO-STUDIO, 1989, Szilvási László, H-1675 Budapest, p.k. 87, Hungario



Perantaj novaĵoj

Argentino: Ni anoncas unuafoje peranton ĉi tie. Argentina Esperanto-Asocio, C.C. 1428, RA-5000 Cordoba. La tarifon ĝi mem anoncos en aŭstralaj enlande.

Jugoslavio: La jarabono 'malaltiĝis' de 20.000 ĝis 3 dinaroj. Bedaŭrinde, vi ne ŝparas 19.997 dinarojn, ĉar oni kreis novajn dinarojn, kiuj valoras 10.000 malnovajn. Peranto restas Tereza Kapista, Studentska 39/23, YU-11070 Novi Beograd.

Bulgario: BEA ne plu peras abonojn. Eblas mendi tra la ŝtata perejo REP kontraŭ 2,40 levoj, sed nur ĝis novembro por la sekva jaro. Nova perantino akceptos abonojn je tiu prezo tra la tuta jaro: Lilija Pavlova Koleva, Bulv. Cvetko Radojnov 10/2, BG-1527 Sofia.

Kubo: Kuba Esperanto-Asocio, Apto. Postal 2018, La Habana 2, mendis cent ekzemplerojn por 1990; kubanoj bv. turni vin al ili por specimenoj kaj abonoj.

Pri Japanio, Ĉinio, neniu progreso.

Renkontiĝu somere

Por la sesa fojo sinsekve la Esperanto-Ligo de Bosnio kaj Hercegovino en Jugoslavio organizas Junpioniran E-Someron de la 23a ĝis la 30a de junio en la montara hotelo Stambulčić, proksime al Sarajevo. Ĉin partorpenas kutime ĉ. 80 gelnantoj, 11-15-jaraj. Informojn donas ELBH, D. Ozme 7/IV, YU-71000 Sarajevo.

La enketilo de ILEI

Ni pardonpetas, ke ne aperas ĉi-numere resumo de la enketo de ILEI pri instruado. Pro spacomanko — ni ricevas pli da kontribuoj ol ni povas aperigi sur nia modesta nombro de paĝoj — kaj pro tempomanko tralabori la rezultojn, kaj pro la fakto, ke respondoj ankoraŭ alfluas, ni ne povas aperigi nun rezultojn. Ili aperos en Internacia Pedagogia Revuo kaj ni aperigos kelkajn en estonta Juna amiko

Dek fabeloj

Lernolibro por grupa legado aŭ hejma studado de Charlotte Kohrs kaj Dorothy Kruger

Jen nova 36-paĝa grandformata lernilo eldonita de 'La Tigro: Libro en Esperanto, 3876 Belmont Avenue, San Diego, CA 92116, Usono. Ĝi prezentas dek popolajn fabelojn en dialoga formo, ĉiu kun tre allogaj desegnaĵoj de Alan Henderson. La kompostado kaj preskvalito estas laŭdinda, la libro tre taŭgas por aktivigi lernantojn inter la aĝoj de 8 kaj 14. Enkonduke ni trovas klarigojn kaj sugestojn por la instruisto; post ĉiu fabelo sekvas vortlisto kun anglaj tradukoj, fine oni prezentas korelativojn en la fabeloj helpe de anglaj tradukoj, sed krom tio ĉio estas Esperant-lingva. Librofine troviĝas kvin paĝoj da aktivigaj ekzercoj.

La verko ja ne estas memstara lernolibro en la kutima senco, ĝi estas aktiva legolibro por post-komencantoj, ja didaktike strukturita, ĝi aparte valoras por montri kaj ekzercigi la uzon de afiksoj en kuntekstoj. Detala recenzo aperos en *Internacia Pedagogia Revuo*. Ni klopodos akiri stoketon de ĉi tiu libro en Hungario per interŝanĝado.

La petolema amanto

Estis iu fraŭlo, kiu havis plum-amikinojn el iu orienta kaj bela lando. Ili longe korespondis kaj interŝanĝis diversajn aferojn. Iom post iom ili enamiĝis unu al la alia, sed nek la fraŭlo, nek la fraŭlino kuraĝis esprimi sian flam-amon al la alia. Okazis, do, sensolva problemo kaj malĝojiga afero. 'Kion mi devas fari?' kaj 'Kiel oni esprimas la sekreton de la koro?' Tiu ĉi demandoj estis ilia ĉiutaga dilemo. Finfine, la fraŭlo elpensis ian interesan rimedon por esprimi sian kor-diron kaj ankaŭ ricevi la am-vortojn de sia amatino. Li planis fraz-enigmon kaj skribis al sia amatino tiel:

Mia kara,

Jen mi havas por vi enigmon. Se vi ĝuste solvos ĝin, vi ricevos de mi premion tre valoran. Bonvolu legi la suban rakonton kaj elekti taŭgajn vortojn por la sen-vortaj lokoj.

Nun post longa korespondado mi bone(1)..... vin. Eĉ pli ol vi(2)..... ĉar mi povas diveni, ĵus en ĉi tiu momento, pri kio vi pensas kaj kiun vi(3)..... antaŭ viaj okuloj. Mi ne nur divenas, sed ankaŭ mi certas, ke vi(4)..... min. Mi ankaŭ scias, ke vi(5)....., ke mi(6)..... min. Sed same kiel mi, vi pro(7)..... ne povas(8)..... tion. Laŭ proverbo, niaj(9)..... tuŝas unu la alian. Mi ne nur(10)..... vin, sed pensas, ke(11)..... indas resti ĉe(12)..... kiel mia(13)..... por(14)..... ĝis la(15)..... Mi opinias, ke vi estas la plej taŭga fraŭlino, kiu estas elektinda, kiel mia(16)..... Mi bone komprenis, ke ankaŭ vi(17)..... min kiel vian(18)..... laŭleĝan. Mi imagas vian ĝustan solvon, kiel vian konsenton al mia intenco, kiu estas(19)..... kaj vi ricevos la valoran premion baldaŭ en nia(20)..... festo.

Jes, miaj junaj amikoj, la juna fraŭlino entuziasme kaj kun granda ĝojo solvis ĝuste la enigmon kaj tuj en la ĉeesto de iliaj parencoj ricevis la premion, kiu estis ora(21).....(22).....

Aliajn premiojn ofertas la verkinto: ankaŭ vi solvu la enigmon kaj sendu la solvon al li: Morteza Mirbaghian
P.O. Box 37185, 3331
Qom, Iran.

Dek kvin el la solvintoj ricevos serion da belaj poŝtmarkoj kaj bildkartoj el Irano. La solvon ni aperigos en estonta numero. Sukceson!

Deziras korespondi

dez. kor. = deziras korespondi

tutm. = tutmonde

ĉ.t. = ĉiuj temoj

i.a. = interalie

ktp. = kaj tiel plu

ks. = kaj simile

bk. = bildkarto

pm. = poŝtmarkoj

Ni aperigas korespond-petojn de junuloj, klasoj kaj instruistoj senpage. Anoncojn de aliaj plenkreskuloj ni ne aperigas. Bv. skribi klare (latin-litere) kaj doni sufiĉajn informojn: aĝon, sekson, interesojn. Bonkvalita foto (prefere nigra-blanka) bonvenas.

Germana DR

Instruistino, Katrin Bormann, Burgholzstr. 6, DDR-2000 Neubrandenburg: juna infanĝardenistino dez. kor. kun similaj pedagogoj tutmonde.

Hungario

Majer Gábor, Kastélykert út 10, H-3000 Hatvan, 15-jara faklernejano dez. kor. pri fiŝkaptado, muziko kaj papagoj.

Pollando

Magdalena Malcherek, ul. Zareby 42/20, PL-43-135 Tychy, 13-jara, dez. kor. kun Francio, Italio, Usono, Svedio, Japanio kaj Litovio. Kolektas glumarkojn, bk., kalendarojn. Ŝatas biologion kaj arkeologion.

Adam Choroszewski, Zgrzebniocka 56/6, PL-43-100 Tychy, 13-jara dez. kor. kun okcidentaj landanoj, interesiĝas pri muziko, komputiloj kaj fantastiko.

Renata Czarniecka, ul. Kanonierska 3, PL-58-100 Swidnica, 17-jara, interesiĝas pri muziko kaj historio. Ŝatas aŭskulti radion kaj sondiskojn.

Marta Naszzenis, ul. Syrokomi 7, PL-19-400 Olecko, 16-jara lernantino, interesiĝas pri turismo, literaturo, sporto. Kolektas bk.

Ewa Kucik, Zaryoe Wlk. 95, PL-34-142 Lencze, 17-jara, interesiĝas pri Esperanto, muziko kaj turismo.

Magdalena Smidowicz, ul. Boguslawskiego 7/14, PL-31-048 Kraków, 13-jara, interesiĝas pri muziko, inkl. de pezmetala.

Adriana Solek, ul. Powstanców SI 1/4, PL-45-086 Opole, 15-jara knabino interesiĝas pri biciklado, dancado kaj kantado, kolektas bk. kun bestoj.

Joanna Kletkiewicz, woj. Włocławskie, PL-87-617 Bobrowniki n/Wista, 13-jara, ĉ.t.

Cezary Kletkiewicz, sama adreso, 8-jara, pri ĉ.t. Ili estas Esperanta familio, ankaŭ la patrino estas esperantistino.

Sovet-Unio: Litovio

Laima Kastrickaite, Montrilos 17, SU-235307 Panevežis, 17-jara junulino, dez. kor. tutm. pri ĉ.t. Interesiĝas pri muziko, ludas pianon.

Nilija Jakstiene, p.d. 429, SU-235802 Klaipeda: instruistino, kies grupo produktas pentraĵojn kaj artaĵojn el argilo kaj deziras partopreni en ekspozicioj aŭ konkursoj.

Sovet-Unio: Ceteraj

Kristina Konovalova, prosp. Mira 6/01-42, SU-423819 u. Naberežnie Ĉelni, 11-jara, dez. kor. tutm. kaj interŝanĝi bildojn, kalendarojn kaj insignojn.

Julija Polakova, Lenina 26-13, SU-684010 Jelizovo, Kamchatka, 13-jara knabino el la plej orienta parto de Sovet-unio dez. kor. tutm. Ŝatas legi, pentri, kudri, intereso: muziko, biologio, literaturo, matematiko.

Vjaĉeslav Vdovenko, ul. Vatutina 50 A, Rostovskoj obl., SU-347937 Taganrog, 18-jara studento dez. kor. tutm. pri ĉ.t.

Grupo de 10- ĝis 15-jaraj geknaboj dez. kor. tutm. Intereso: kantado, turismo. Klubo Smeraldo, Kulturpalaco, pl. Dzerzinskogo 16, SU-314000 Poltava, Ukraino.

Mifajlov Aleksandroviĉ, Lenin ul. 34-56, SU-144000 u. Elektroŝtali, Moskva obl. 12-jara knabo, interesiĝas pri fotado kaj muziko.

Antipov Slava, Industrialnaja 43-427, SU-456930 Kusa, Ĉelabinsk. 15-jara, studas fotografion, sportas, kolektas pm. kaj monerojn.

Klubo de Internacia Amikeco 'Espero', Mezlernejo 28, Nefjodova str. 10, SU-153022 Ivanovo. 12 infanoj, 11-16-jaraj dez. kor. tutm. unuope kun similaj klubanoj pri ĉ. t.

Respondoj de paĝo 12

1. Rezultas verdo.
2. Rezultas oranĝkoloro.
3. Rezultas rozruĝo.
4. Rezultas purpuro.
5. Rezultas grizo.
6. Rezultas bruno.

7. Rezultas kolera art-instruisto, ĉar oni ne rajtas tiel malŝpari la inkojn. (Teorie, se oni miksas ĉiujn kolorojn oni ricevas blankon, kiu estas la sumo de ĉiuj koloroj. Sed praktike, ĉar farboj kaj inkoj ne prezentas purajn aŭ perfektajn kolorojn, la rezulto estas malbela griz-brunaĉa kaĉo.)

Klubo de legantoj

Pro la granda fluo de kontribuajoj ni ne povas aperigi la Klubon de legantoj ĉi-foje, sed fakte la rakonto el Irano sur paĝo 21 ofertas similan legaĵon kaj konkurson, do ne ĉefian sed iranajn premiojn vi povos gajni ĉi-foje.

Via redaktoro multe vojaĝos ĉi-jare, kaj esperas renkonti multajn legantojn persone. En marto, dum oni presas ĉi tiun numeron, li estos en Sovet-unio, kie plej abundas la legantoj, kaj renkontos esperantistojn en Rostov-Don kaj eble eĉ en Erevano. En aprilo Kultura Centro Esperantista en Svislando estos la celo, kie la novaj internaciaj ekzamenoj de UEA/ILEI estos denove ofertataj. En majo venas la vico de Skandinavio, unue en Norvegio, kie pretiĝas seminario por la deĵorontoj en la Universala Kongreso de 1991, okazonta en Bergen. Majofine, Svedio kaj la mirinda KEF (Kultura Esperanto-Festivalo) sekvata de la renomaj kursoj en Kungälv.

Se estas junio, devas esti San-Francisko, kie de jaroj la universitato proponas inten-

sajn tri-semajnajn somerajn kursojn — tie la redaktoro elprovas plurajn el la rol-ludoj aperintaj en Juna amiko kun la kursanoj. Tio gvidas logike al Kubo, al la UK en Havano kaj la konferenco de la instruistoj en Hanabaniĵa, 300km. sudoriente de la ĉefurbo.

Praktika rezulto de tiu vojaĝado kaj kursodonado estas, ke la redaktoro ne sidos en Budapeŝto por tuj respondi viajn leterojn — do paciencon, bonvolu. Tamen la numeroj de Juna amiko aperados regule, eĉ pli frue, pro la forestoj, kaj la ekspedado restos prizorgata. Sed bonvolu noti legantoj kaj perantoj, ke krom tio, la redakcio en marto kaj de majofino ĝis septembro estos nigra truo — malagrabla konstato post tiu ĉi koloroza numero.

La ĉeftemo estos 'Ĉu Esperanto estas pontolingvo aŭ cellingvo?' do la programo prezentos kaj kulturajojn de Esperanto mem, kaj tradukaĵojn el aliaj kulturoj. Ekspozicioj, arta, filma kaj teatra vesperoj, ekskursoj tra Budapeŝto, al Szentendre, Hollókő la parlamento kaj la grottoj Pálvölgyi, movado-tema konferenco kaj balo ĉiuj figuras en la riĉa programo. Partopreno por orient-eŭropanoj 3740 forintoj kun duonpensiono, por alilandanoj 275 gld., aŭ en hotelo kun duonpensiono 363 gld. Informojn donas Espertur, pĝ. 193, H-1368 Budapeŝt.



La mondo de estonteco — de junaj

Homo simple — naskiĝas. Ĝi ne elektas gepatrojn, nek la urbon, nek la ŝtaton en kiu ĝi ekrigardos la unuan radieton de la suno. Ĝi ne elektas eĉ la propran haŭtkoloron, nek hararon, nek okulojn. Ĝi simple fariĝas loĝanto de ĉi tiu dubinda, sed kara planedo.

Kaj kreskas, kreskas. Larĝigas siajn horizontojn. Sorbas sian sperton. Kaj abunde kreskas. En ŝia juneco ĝi deziras pli multe, pli, ankoraŭ pli multe... Kaj ĝi sentas, ke ekzistas ankoraŭ multe da malbono, maljusto. Jes, multon oni devas fari, lerni, eksciadi. La scio estas tiu mirinda forto, kiu donas la potencon — potencon sur la naturo kaj homaj fortoj. En tiu scio estas ankaŭ la mondo de elektroniko, akordo de koloroj kaj la beleco de muziko, kaj la mondo de l'fantazio kaj — vivo — la tuta!

Konas tion la juneco, kiu dense kreskas el deziro okupi la mondon. Tiuj junaj estas iniciatantoj de la rado de historio. Ili alportas la ŝanĝojn, ili kondukas al la progreso. Ili detruas barikadojn de pasinteco kaj sindeteno.

Sed la vivo fluas ... la rivero de la vivo serpentumas, iras en diversajn regionojn, zigzagas, kunportas el ĉiu regiono po iom, kiu restas por la tuta vivo. Ĝi portas la belecon de la vivo, de ekzistado kaj konscion, ke ĉio tio estas neripe-tebla, ke oni devas ĝin bone utiligi.

Kaj junaj ŝanĝas ĉion ĉirkaŭ si. Ili deziras la mondon indan je homo, la mondon de l'paco kaj prospero, la mondon de estonteco, sen nuklea danĝero, sen bomboj kaj militoj. Ili deziras vivon en Edeno, fratecan, komunan. Sen limoj kaj dividoj, kaj kun multaj pontoj, kiuj kunigas, sed ne malkunigas la bordojn de la vivo. Junaj deziras kiel eble plej bone interkompreniĝi, paroli per unu lingvo kaj ĉiuj ĝin percepti sendepende sur kiu ajn meridiano ili estas. Tion ebligus al ili la Internacia Lingvo, Esperanto. Ĝi estas la lingvo de la estonteco, la lingvo de tutmonda unueco, la lingvo de la kosmo, kiun junaj konkeros. Ĉiuj aŭroro kaj mateno portas junajn korojn plenplenaj je deziroj ekscii kaj per propra entreprenemo ŝanĝi ĉiutagaĵojn. Junaj tion deziras, junaj tion povas, estas necese nur doni al ili ŝancon.

*Dragana Veljkovic,
13-jara lemantino el
Leskovac, Jugoslavio (junio 1989)*